

## La Korespondado

preparis Leston Buell

### 1. Demandoj

1. Ĉu vi korespondadas kun alilandaj Esperantistoj? Kun ne-Esperantistoj?
2. Kiam vi unue ekhavis korespondamikon?
3. Ĉu vi iam interamikiĝis kun iu per korespondado kaj poste renkontis lin aŭ ŝin?
4. Ĉu vi konsideras vin bona korespondanto?
5. Ĉu vi korespondadas precipe per poŝto tradicia aŭ per retpoŝto?
6. Kiuj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la tradicia poŝto?
7. Kiuj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la retpoŝto?
8. Ĉu vi legas viajn retmesaĝojn en la navigilo aŭ ĉu vi uzas apartan programon por legi kaj sendi mesaĝojn?
9. Kie oni trovas novajn korespondamikojn?
10. Kiam vi ricevas leterojn el fremdaj landoj, ĉuam estas facile legi la skribaĵon?
11. Kial la korespondado interesas as vi kaj al aliaj personoj?
12. Kiel ofte vi sendas leteron skribitan mane? Salutkarton? Poŝtkarton?
13. Ĉu vi iam tajpas personajn leterojn?
14. Kiujn materialojn (paperon, ktp.) oni bezonas por skribi kaj sendi leteron?
15. Priskribu ĉiun etapon bezonatan por skribi kaj sendi leteron, ekde kiam vi prenas paperon kaj skribilon en vian manon ĝis kiam vi metas la koverton en la leterkeston.

## 2. Utilaj Vortoj

poŝto, poŝti, poŝtisto	tajpi, tajpilo
sendi	presi, presilo
letero	leki
pako	skribilo, plumo, krajono
koverto	inko
poŝtmarko	leterkesto
navigilo	folio
retadreso, retpoŝtadreso	

## 3. Ekzercoj

*Ekzerco 1.* Ŝanĝu la frazojn laŭ la unua.

1. Maria estas babilema infano.  
Maria estas infano, kiu multe babilas.
2. Eva estas demandema lernantino.  
Eva estas lernantino,....
3. Johano ne estas drinkema viro.  
Johano ne estas viro,....
4. Marta kaj Gerda ne estas parolemaj personoj.  
Marta kaj Gerda ne estas personoj,....
5. Petro estas nelaborema fraŭlo.
6. Adamo kaj Liza estas fotemaj eskursanoj.
7. Paŭlo estas grumblema oldulo.
8. Tereza kaj Marko estas krokodilemaj samideanoj.
9. Klara estas ŝercema knabino.
10. Stefano estas petolema bubo.

Ekzerco 2. Ŝanĝu la frazojn laŭ la unuaj du. Atentu pri la akuzativo.

1. Tiuj infanoj estas babilemaj.  
Tiuj estas la infanoj, kiuj babilas.
2. Mi vidis tiun viron hieraŭ.  
Tiu estas la viro, \_\_\_\_\_ mi vidis hieraŭ.
3. Tiu francino recenzas bone.  
Tiu estas la francino, \_\_\_\_\_ recenzas bone.
4. Tiuj du gejunuloj aktoras tre bone!  
Tiuj estas la du genejunuloj, \_\_\_\_\_ aktoras tre bone!
5. Mi ne ŝatas tiun fromaĝon.  
Tiu estas la fromaĝo, \_\_\_\_\_ mi ne ŝatas.
6. Ni jam legis ĉi tiujn artikolojn.  
Ĉi tiuj estas la artikoloj, \_\_\_\_\_ ni jam legis.
7. Tiuj fraponoj batis min.  
Tiuj estas la fraponoj, \_\_\_\_\_ batis min.
8. Mi jam aŭskultis tiun diskon.  
Tiu estas la disko, \_\_\_\_\_ mi jam aŭskultis.
9. Mi ankoraŭ ne vidis tiujn filmojn.  
Tiuj estas la filmoj, \_\_\_\_\_ mi ankoraŭ ne vidis.
10. Tiu eldonejo vendas multe da libroj.  
Tiu estas la eldonejo, \_\_\_\_\_ vendas multe da libroj.

#### 4. Lingvaj Rimarkoj

*Letero, litero.* La vorto *pomo* enhavas kvar literojn. Letero enhavas multajn vortojn.

*Skribi, verki.* Oni skribas vorton aŭ leteron. Oni verkas novelon aŭ poemon. Laŭ PIV, *verki* signifas « per spirita laboro, krei aŭ produkti ion novan en scienco aŭ arto ».

*Redakti.* Laŭ PIV, *redakti* signifas aŭ « skribe esprimi en definitiva forma, prilabori laŭcele la esprimmanieron: *redakti siajn pensojn; vi volu redakti ĉiun paragrafon tute klare kaj precize; vidu verki, formuli, vortigi*» aŭ « direkti publikigon de gazeto, revuo kaj simile, elektante por ĝi artikolojn, korektante kaj revizianta ilin ».